**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 43

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Pli bona branĉo sennuksa, ol **k** ␣ **ĝ** ␣ plej luksa.

**2.** En multaj ŝtatoj gen-maizo kaj gen-tritiko estas malpermesitaj, ankaŭ ␣ **r** ␣ **t** ␣ ␣ ␣ kaj kort-birdojn nutritajn per gen-manipulaĵoj oni ne plu povus vendi.

**3.** Marsejlo estis la Eŭropa Kultura Ĉefurbo sub la nomo "Marseille Provence 2013", la kultura ␣**v**␣ **nt** ␣ okazis ne nur en Marsejlo, sed en la tuta regiono.

**4.** Mia plej juna filino naskiĝis surda, verŝajne pro malsano, kiun mi kaptis dum epidemio de iu grava gripo, kiam mi estis 4-monate ␣ **r** ␣**v**␣ **d** ␣.

**5.** Okaze de la ␣ ␣ **b** ␣ **l** ␣ ␣ "200 jaroj de la Aŭstra Nacia Banko" la poŝto eldonis specialan poŝtmarkon la 18an de januaro 2016.

**6.** Malsanulejen iris la virino, manĝinte plurajn kernojn de abrikoto kaj ␣ ␣ **rs** ␣ **k** ␣, aŭ pli precize ilian enan molan parton, same toksan por homo.

**7.** Reinhold Messner estas unu el la plej ␣ **kt** ␣**v**␣ ␣ naturprotektantoj en okcidenta Eŭropo, de la montaroj, de Alpoj kontraŭ la invado de amasa turismo.

**8.** Matene kaj tagmeze oni mem zorgis pri la manĝaĵo, vespere oni komune manĝis bongustan **v** ␣ **g** ␣ **t** ␣ **r** ␣ ␣ manĝaĵon.

**9.** La taŭro ␣ **mp** ␣ **t** ␣ ␣ en la cirkon, kaj per siaj minaceme levitaj kornoj krakege frapas kontraŭ la ruĝlinian trabaĵon – incitistoj klopodas trompi ĝin per tukmovaj fintoj.

**10.** ␣ **r** ␣ **p** ␣ **g** ␣ **nd** ␣ estas nenio alia ol reklamo, kaj oni jam komprenis, ke la reklamo devas esti adresita.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** Kiam la korno de kapreolo **j** ␣ **k** ␣ ␣, la kapreolo frotas ĝin kontraŭ arboŝelo kaj la arbo estas damaĝita aŭ eĉ mortas.

**2.** Nun, tiu ĉi artkonstelacio konsistas el 24 satelitoj pasantaj laŭ diversaj **c** ␣ **r** ␣ **l** ␣ ␣ orbitoj, proksimume 22 200 km alte super la marnivelo.

**3.** Festoj kaj **b** ␣ **l** ␣ ␣ sekvis unu post la alia, kaj ŝajnis, ke la stelo de la imperiestro brilas la plej hele, antaŭ ol ĝi por ĉiam estingiĝos.

**4.** Mi metis kelke da kestoj sur boaton, sed ne atendis por eltrovi, kion ili enhavas, kaj kun ili kaj tri **b** ␣ ␣ ␣ **l** ␣ ␣ da rumo, mi revenis.

**5.** En la rumana flanko, sur la vojon nomatan "Eŭropa Koridoro 4", dum la rikolta sezono oni surŝutas grenon sur la varmegan **a ␣ f ␣ lt ␣ ␣** por sekigi ĝin.

**6.** La fenicia **p ␣ ␣v␣ r ␣ ␣** diras: pli bona estas hordeo en la grenejo, ol oro en la dezerto.

**7.** Fine la rabeno benis la ĉeestantaron kaj la **ĥ␣ ␣ ␣**, akompanata de orkestro, prezentis *ha Tikvah*, la kanton de espero kaj la nacian himnon de Israelo.

**8.** Samtempe la faraono komisiis al la fidelaj oficistoj kaj polico komenci **a ␣ ␣ t ␣** kontraŭ la pastroj kaj por la sepa tago de la ripozo.

**9.** Karobopulvoro, kies saporo treege similas al tiu de ĉokolado, tre bone anstataŭas **k ␣ k ␣ ␣ ␣** kaj sukeron en kia ajn recepto: biskvitoj, tortoj, trufglaciaĵoj ktp.

**10.** La novaj posedantoj rekonstruus prizonkamerojn por tie **e ␣ t ␣ b ␣ ␣** komfortajn apartamentojn, kaj fermitajn prizonkortojn ili reorganizus al imponaj vintraj ĝardenoj.

**Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

menci', oblikv', lul', bind', korekt', rivel', falĉ', gust', venĝ', incit'.

**1.** Post kiam la greno maturiĝis, mi faris **␣ ␣ ␣ ĉ ␣ l ␣ ␣** el glavo kaj havigis mian rikolton.

**2.** En la internaĵo de la dometo al la plafono estis alligita **␣ ␣ l ␣ l ␣**, en kiu la infano de Doroteo ripozis per trankvila dormo.

**3.** La unusola homo kiu legas la revuon antaŭ ol mi sendas ĝin al la presejo estas tre honesta esperantisto kaj **␣ ␣ r ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ t ␣**, Rob Moerbeek, kiu interesiĝas nur pri lingvaj malglataĵoj.

**4.** Fine Beogrado cedis al la ultimato, kaj la jugoslavia armeo retiriĝis el Kosovo, lasante al la venantaj pacigaj trupoj spurojn de etna purigado kaj **␣ ␣ ␣ ĝ ␣ m ␣ ␣ ␣** armitajn kosovanojn.

**5.** Registara dokumento listiganta la "krimojn" de Sadam **␣ ␣v␣ ␣ ␣ ĝ ␣ ␣** kiel plagiato: la klaŭnoj kunskrapis "milito-pravigilon" el doktoriĝa disertacio kaj diversaj Interret-fontoj.

**6.** Revenante al la temo de la tero, Galadí-Enríquez klarigas rotacion, la signifon de la malkovro de Foucault, la translacion, la **␣ ␣ ␣ ␣ ␣v␣ c ␣ ␣** de la ekliptiko, ktp.

**7.** Meze de la vojo Viktoro estre korektis per senĉesa batado altkreskan fraŭlon, dufoje pli fortikan ol si, por lin puni, ĉar ĉiam li **␣ ␣ c ␣ ␣ ␣ t ␣ ␣** la malfortajn infanojn.

**8.** Bonŝance, la altranguloj, povos komenci la **␣ ␣ ␣ t ␣ m ␣ d ␣ ␣** de la belga kuirarto.

**9.** En la arbaro vivas bestoj, el kiuj **␣ ␣ n ␣ ␣ ␣ ␣ d ␣ ␣** brunaj ursoj kaj lupoj.

**10.** Bedaŭrinde la **␣ ␣ n ␣ ␣ ĵ ␣** de la libro estas tiom nefortika, ke ĝi rompiĝis antaŭ ol mi finis la legadon.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** Mi estus dirinta, ke la juna ___ indiferentas pri politiko: se la stultaĵo de Blair gejunulojn politike provokas, jen eventuale la unusola pluso en tiu ĉi krome senplusa kaĉo.

**a.** konkordo **b.** ciro **c.** generacio **d.** kaĝo

**2.** La oranĝaj kaj granataj arboj estis kovritaj de floroj, kaj sur la kampoj oni semis la linon, hordeon, fabon, ___, kukumojn kaj aliajn legomojn.

**a.** fazeolon **b.** kaĉon **c.** jugon **d.** raŭpon

**3.** Ekde fora antikveco Kaŭkazio estis granda ___, en kiu fandiĝis popoloj de diversaj lingvoj, vivmanieroj kaj historio.

**a.** konfidenco **b.** laĉo **c.** cirkelo **d.** kaldrono

**4.** La ĉefa trajto de la egipta ___ estas la varmego; en januaro oni havas 10 gradojn super la nulo, en aŭgusto 27, iafoje la varmego atingas 47 gradojn.

**a.** radiatoro **b.** muzelo **c.** klimato **d.** puso

**5.** Ni afable traktis la militkaptitojn; niaj soldatoj kaj ___ dum la militpaŭzoj iris al la antaŭpostenoj kaj preskaŭ brakumis la malamikojn, eĉ trinkis vodkon kun ili.

**a.** akordoj **b.** resumoj **c.** brandoj **d.** oficiroj

**6.** Poste la princo rememoris la vortojn de la edzino de l' kamparano, ke jam de unu monato ili ne manĝas grenon, sed la grajnojn kaj radikojn de ___ .

**a.** lotuso **b.** tendenco **c.** kabano **d.** violono

**7.** La mallumo estis netrapenetrebla, nur de la ___ sur la antaŭaĵo de la lokomotivo estis distrata antaŭen elektra lumo.

**a.** rimeno **b.** testudo **c.** lanterno **d.** volumeno

**8.** Eksonis ___ kaj tamburoj kaj oni komencis la triumfan marŝon.

**a.** rimoj **b.** trumpetoj **c.** kajutoj **d.** brutoj

**9.** Tiuj hidrometeologiaj okazaĵoj preskaŭ ĉiam kuntrenas ___ pluvegojn, kiuj por la kuba loĝantaro iĝis profitigaj pro la ekstrema sekeco, kiu karakterizas kelkajn el la provincoj.

**a.** rigidajn **b.** lojalajn **c.** subtilajn **d.** torentajn

**10.** En la dezerto la homon minacas la leono kaj ___, en la kavernoj la drako, inter la floroj la venena serpento.

**a.** skorpio **b.** sciuro **c.** ĉerko **d.** alaŭdo